The Wayback Machine - https://web.archive.org/web/20050408080855/http://www.globidar.org:80/solidareco/mseo65.htm



**bulteno de Monda Fonduso de Solidareco Kontraù la Malsato, numero 65**

---

(enhavo je la fino)

# *Bonan jaron al æiuj !*

Æar Granda Cimulo ne manøis nin, æar la Tero plu samdirekte rotacias, æar neniu bonfaranta feino faris anstataý ni la laboron, kiun ni komencis, æar jen ni denove kunaj en tiuj komenciøo - jam pasinta - de la jaro 2000, mi deziras al vi, ni deziras al vi, ni reciproke deziras al ni kiel eble plej bonan finon de la jarcento kaj de la jarmilo (vidu la artikolon "Stop' !" de nia amiko Claude Tellier pri tiu temo sur la paøo 2).

Farota laborego : okazos nia unua Monda Federacia Asembleo...

Farota laborego : ni ekstarigos la demokratajn mondfondusajn strukturojn, kiuj iom post iom anstataýos nian provizoran Administran Konsilantaron, samtempe kiam novaj regionoj aldoniøos al tiuj de okcidenta Afriko kaj de Eýropo.

Farota laborego : tiom multaj grupoj, familioj, vilaøoj atendas la financadon de projekto, kiu ebligos al ili restariøi kaj certigi sian dignon... Kaj estas tiom multaj farota¼oj, por kreskigi la financkapablojn de Monda Fonduso.

Nu, komencante, ni provos en Monda Solidareco pliproksimiøi inter ni. Ekde tiu æi numero, ni inaýguros novan rubrikon "Reveno al projekto", en kiu ni priskribos æiufoje la æirkaýmedion, la historion, æiujn detalojn de projekto financita de Monda Fonduso kaj realigita de partnera grupo de nia mutuala asocio . Ni deziras, ke la legado de tiuj spertoj konkrete informu niajn membrojn pri la vivaj kaj laboraj kondiæoj de iliaj partneroj, same kiel pri la kondiæoj de realigado de la projektoj. Tiun rubrikon malfermos la togolanda grupo Maýena de Gadjagan.

Bonan legadon !

*Alain Cavelier*

---

(enhavo je la fino)

# S T O P !

Por la ajmaraj indianoj, øi estas la 15a Wilikha-kuti, por la tibetanoj la 25a tago de la 11a monato de la jaro 2126, por la Libianoj la 24a de ramadano de la jaro 1420, por la egiptaj koptoj la 22a de Kyakh 1716, por la etiopoj le 23a de Tahsas 1992, por la Bahaanoj la 2a Sharaf 156, por la framasonoj, la 1a tago de la 10a monato de la jaro 5999, por la Nepalanoj la 11a de Paush 1120 (kaj eæ tio laý la oficiala nepala kalendaro, æar ekzistas ankaý la nepala erao Bicram, kiu jam atingis la jaron 2956), ktp. ktp.. Kaj por la kristanoj, praktikantoj aý ne, submetitaj je la gregoria kalendaro (tiu kiu komencas sian jaron 1 - kun probabla eraro de 4 øis 7 jaroj - je la naskiøo de Jesuo), øi estas la 1a de januaro 2000, la unua tago de la lasta jaro de la 20a jarcento kaj de la 2a jarmilo.

Trapasi, laý la gregoria kalendaro, de 1999 al 2000, bone meritis esceptan feston. La homaro ne povas vivi nur en doloro, nur en sufero.

Kaj la trapaso al la jaro 2000, malgraý øiaj troigoj, estis festita tiel en Pekino kaj Hongkongo, kiel en Tokio kaj Betlehemo, kiel en Sydney aý en Parizo, de øojaj popoloj, kies kalendaraj kaj kredaj referencoj discelas. Iel unueco en diverseco.

Kaj probable la esprimo de tre forta komuna deziro finfine vivi en paco, frateco, kaj harmonio.

Æu iuj festas la unuan tagon de sia jaro 2000, æu aliaj estas je la 24a de ramadano 1420, æu ankoraý aliaj sin preparas, en februaro, por komenci la jaron de Drako, ili estas, æiuj kune ni estas la homaro. Tiu homaro, kiu bedaýrinde ne liberiøis de siaj suferoj. Sed dum parto el niaj suferoj rezultas el naturaj katastrofoj (sismoj, uraganoj, þtormoj... ), kontraý kiuj homo ne multon povas kaj en kiuj æiel øia respondeco estas kvazaý nula, alia parto el la naturaj ekscesoj devenas de larøa respondeco de la homa konduto (inundoj, terenglitadoj, øenerala plivarmiøo de la planedo...). Kaj kompreneble la plej grava parto de la homaj suferoj troviøas en la milito. Nu oni povas timi, ke tiu jaro 2000 kaj eæ la estonta jarcento estos tiel barbaraj kiel estis la jaro 1999 aý la dudeka jarcento.

Tial, se unu fojon, æiuj homoj en la tuta mondo, kiuj ajn estas iliaj filozofiaj aý religiaj konvinkoj, æiuj kiuj festemis tiun nokton kun en la koro la deziro por iom malpli da suferoj, tiu deziro por iom pli da homeco, laýte proklamus : pri milito, STOP ! pri poluadoj, STOP ! pri nigraj alflusoj STOP ! pri æiuj tiuj suferoj, kiujn ni trudas al ni mem per nia stulteco kaj nia orgojlo, STOP !

Ke ni devas suferi la verajn naturajn katastrofojn, devus sufiæi. Ne indas aldoni al ili. Æar ni ne povas multon kontraý la uraganoj kaj la pluvegoj, ni almenaý decidu pri cetero STOPON !

Resume, kiel diras la poeto, Claude Nougaro, la eta Tuluza virbovo :

Estus tempo por ke homo sin amu
De kiam tiu æi semas sian malfeliæon
Estus tempo por ke homo sin amu
Estus tempo, estus momento.

Nu, kiel hazardo, tio estas eltira¼o de kanto, kiu nomiøas ... ***ASSEZ !*** (STOP !)

*Claude Tellier, 1an de januaro 2000 de la gregoria kalendaro.*

---

Nia agado en Haitio

# la agrikultura magazeno de Ljankur

(projekto n9501.HT)

Depost 1992, Monda Fonduso havis rilatojn æu kun asocioj aý personoj en Haitio mem, æu kun anoj de la diasporo de tiu lando, en kiu nia mutuala societo nun nombras dek du membrojn.

La respubliko de Haitio, tre malnova franca kolonio en Kariba maro, unu el la plej malriæaj landoj en la mondo, apenaý eliras el plej terura diktatoreco.

Jean-Claude Duvalier ("Bebo Dok"), fuøinta diktatoro, lasis Haition en nekredebla malstruktura stato, kaj ankoraý turmentata per la ekscesoj de la timigaj "tontons-macoutes" (spionoj) sed, en 1990 la unuaj liberaj balotelektoj en la lando prezidentigis Jean-Bertrand Aristide ("Titid'"), homo sincere animata per demokrataj kaj reformaj ideoj.

Bedaýrinde en septembro 1991, Raoul Cedras kaj liaj puæintaj soldatoj forpelis Aristide. Tiu æi rifuøis en Usono, devis atendi 1994 por retrovi sian laýleøan postenon kaj tiel fini prezidentan mandaton, el kiu preskaý tri jaroj liaj estis forprenitaj.

Dum tiu periodo de puæa diktatoreco, la spionoj reaperintaj de ombro sovaøe mortigis grandan parton el la plej viglaj kaj sociamantaj. Teroro, kiu mortigis æirkaý 5000 homojn, vera krimo kontraý homaro.

Dum tiuj nigraj jaroj, laý la ritmo de neregulaj korespondoj, nia asocio sukcesis starigi kontaktojn, enregistri kelkajn aliøantojn kaj certiøi je la valora helpo de haitianoj, kiuj restis en sia lando aý kiuj rifuøis en Francio.

En 1992-1993, dank'al la helpo de Kebeka aliøintino, Annie Tochtermann, unua projekto (riparado de akvodukto) en la komunumo Roseau, okcidente de Haitio, estis proponita al ni. Sed malgraý la registrado de kelkaj aliøintoj de tiu regiono, la politikaj okaza¼oj kaj la kompleta poþta manko malebligis la financadon de tiu projekto.

La renkonto de Talleygrand Noël, haitidevena kaj animanto de "Relais" (peranta asocio) apud Orléans (Francio) ebligis al ni plibone ekkoni la staton de tiu lando, kaj ankaý dank'al Pierrette Monselet, mondfondusanino en Tours (FR) kaj membrino de "Relais", ni sukcesis provizi la kamparanojn de la regiono de Verettes (Artibonito) per kelkaj taýgaj legomaj semoj disponigitaj de la Stacio pri Plibonigado de Plantoj de INRA en Rennes (FR) pere de Alain Cavelier.

Poste, en 1995, ni ricevis de Ljankur, en malalta Artibonito, projekton iniciatitan de la Movado de la Kamparanoj en Ljankur (MKL), kooperativa societo, kies responsanto estas Claude Desty.

Tiu projekto celis la instaladon en tiu regiono de agrikultura magazeno (semoj, plantidoj, sterkoj kaj agrikulturaj iloj) por la servo al la kamparanoj de tiu regiono, relative fora de Port-au-Prince, projekto kiu þajnis interesa kaj realigebla, kvankam unue iom tro ampleksa.

Post kiam deko da MKL-anoj aliøis al nia mutuala societo, ni iniciatis korespondadon kaj Adrien Luzincourt, korespondanto de MKL, kiu loøis en la pariza regiono, partoprenis en la starigado de la kontraktaj kondiæoj de tiu projekto.

De 1995 øis 1998, la afero estis malrapida kaj peniga pro la perditaj aý neregulaj koresponda¼oj kaj pro la konsekvencaj miskomprenoj. Æar Claude Tellier provizis nin per kontaktadresoj en Haitio, nun ni disponas pri altvalora helpo dank'al la sekretariino de Fonhades en Port-au-Prince, Rosa Voltaire, kiu aliøis al Monda Fonduso. Æar Rosa disponas telekopiilon kaj elektronikan poþton, ni povis plirapidigi la kontraktigon de la projekto.

La solidareca kontrakto inter MKL kaj Monda Fonduso estis fakte subskribita en aýgusto 1998 kaj ambaý financpartoj estis realigitaj respektive en februaro 1999 (2.287 EUR) kaj aprilo 1999 (2.744 EUR) sub la kontrolo de Rosa Voltaire, kiuj malgraý multaj malfacila¼oj, detale raportis al ni pri la ekipo kaj la provizado de la magazeno kaj ankaý pri la unuaj rezultatoj, kuraøigaj, de la vendoj al la kamparanoj.

Tiu projekto glate iras kaj nun ni devas sekvi ties bonan plenumadon kaj rezultatojn observante atente la tri jarpagojn por la repagado de la prunto (po 610 EUR), repagado tiel grava por la financado de aliaj projektoj.

Tiel Monda Fonduso elvolvas indan projekton en Haitio kaj havas tie kelkajn membrojn. De nun øi devas pligrandigi sian membrokvanton por alfronti aliajn projektojn. Dankon al Rosa voltaire, Adrien Luzincourt, Talleygrand Noël kaj al æiuj, kiuj helpis kaj tute certe ankoraý helpos nin por aliaj mutualistaj kaj solidarecaj aventuroj en Haitio.

Bernard Muet

---

(enhavo je la fino)

# *Kio pri la projektoj ... ?*

## Mallonge el Benino

Georges Kuadjo prezidanto de **G.A.Cocotomey** (dosiero n 96.01.BJ) informis nin pri la novaj øenoj kiuj malhelpis la elvolviøon de la kokbredado en Cococodji (elp: kokokoøi) post la boaa incidento, kiun ni raportis en tiuj kolumnoj (vd en Monda Solidareco n59) : prokrastiøis la provizado de la kokidetoj por rekomenci bredobandon post la vendado de la kadukaj kokinoj postvivantaj, poste kokcidioza epidemio elspeziga pro kuraciloj infektis la breditaron. Do la produkto ne atingis sian plenan evoluon post la planita tempo, kaj la repago de la prunto prokrastiøis. Ni deziras, ke GAC rapide superu tiujn lastajn malfacila¼ojn por fine profiti el la fruktoj de sia laboro.

En Tozunme, Gaston Houssou multe klopodas por "disciplini la regadon de la agutibreda projekto, pro la entuziasmego de liaj samgrupanoj, kiuj sukcesis fari la unuan vendadon de agutioj (dosiero **GOT,** n96.02.BJ), kaj tiamaniere havigis al si sian unuan enspezon post malfacilegaj jaroj. La tuta Mondfondusa komunumo kuraøigas lin gardi la kompason por ke GOT povu plenumi sian devontigon repagi la prunton ekde septembro 2000, tuj post nia federacia asembleo…

## Mallonge el Togolando

Ankaý la **GAP (Grupo Agro-Paþtista) de Gadjagan** (dosiero n92.08.TG) frontis malfacila¼ojn : tro abundaj pluvoj en 1999 øenis la kampajn laborojn, kaj denove bovparo forpasis pro malsano. Tamen la fiþkaptado en la barita lago bone produktas, kaj nun la legomkampo estas irigaciebla ekde tiu bara¼eto dank'al la dispono de motorpumpilo. La prezidanto, Guede K.Mensah, anoncas la repagon de la 3a kaj lasta pruntoparto de la grupo por marto 2000.

Dermane Assoumanou, la Prezidanto de **GAP Bafana Bafana de Abaæang** (dosiero n93.02.TG) suferis kirurgian operacion, kies kosto estis antaýpagita de la grupo, kio pravigis prokraston de la repago de la dua pruntoparto øis fino 1999. Ni deziras al nia amiko pli bonan sanon.

Ankaý **AJPPAV (Asocio de la junaj produktantoj de proteinoj animalaj kaj vegetalaj) de Badou** (dosiero n94.15.TG) suferis la efikojn de la abundegaj pluvoj de 1999, kiuj prokrastis la komencon de la legomkulturo. Tamen AJPPAV iniciatis malgrandan bredadon de kortbirdoj kaj rearanøis la legomidejon. Sed øia prezidanto, Jacques Komlavi Bouka, ankoraý ne precizigas post kiom da tempo ili povos komenci la repagon de la prunto prenita de la grupo.

Siaflanke la **grupo Espero de Agouegan** (dosiero n95.04.TG) repagis en la planita tempo la unuan jarpagon de sia prunto. Øia merito estas des pli granda, ke øi troviøis en preciza areo de la regiono trafita de la porka pesto, fine 1998, kontraý kiu øi scipovis antaýgardi siajn bestojn. Ni aldonu, ke Espero elmontris akran sagacecon, kiam øi þanøis la komenclokon de la projekto por eviti la riskojn je inundoj, kio ankaý gardis øin kontraý la efikoj de la pluvoj en 1999. Gratulon al øia prezidanto Francis Madjisssian kaj al ties kunlaborantoj.

Ankaý 3A konfirmis la konfidon metitan en øin per akurata repago de la unua jarpago de sia pruntopreno por la arbidejo de Agbozo-Kpédzi (dosiero n95.07.TG). Ni aldonu, ke la bara¼eto, kiu irigacias la arbidejon, havas abundan fiþprodukton, kaj ke øi ebligas ankaý la irigaciadon de la vilaøaj kulturoj.

## Mallonge el Burkinio

La financado de la **porkobredejo de AJBS (Asocio de la Junaj Bredistoj en Song-Naba**) de Song-Naba (dosiero n-96.10.BF) finiøis en majo 1999 per la øirado de la dua pruntoparto. Tamen øis nun la grupo povis akiri nur tri porkinojn el dek, kaj unu virporkon el tri. Plie la

Parigado gravedigis nur unu porkinon. Ja tiel la bestoj kiel la bredistoj devas lerni sian metion ! Ni vetu, ke tiuj kontraýa¼oj ne daýros kaj ke æio bone okazos la estontan fojon. Tamen konvenas, ke niaj amikoj atingu la kvanton planitan en la solidareca kontrakto. Ni konfidas al tiu tre vigla grupo, kiu sukcesas interesigi pri Monda Fonduso personojn ne seræantajn financadojn. Pruve, la letero, kiun ni ricevis de S-ro Traoré Boubakar, de Ouagadougou (vd la kadritan tekston). Se multaj kiel li konformigus siajn agojn al siaj konvinkoj, Monda Fonduso ne plu havus financajn problemojn ! Dankon, Boubakar !

*S-ro Christian Trianneau,*

*Kun plezuro mi eksciis la ekziston de Monda Fonduso de Solidareco Kontraý la malsato tra S-ro Symphorien Meda, responsanto de AJES/AJBS. Jam li parolis al mi pri øi sed mi ne vere interesiøis, øis antaý ne longe, kiam mi vizitis ilian realigadon en Poese. Tiuokaze ni interparolis pri la asocio kaj krom la reklamaj flugfolioj, kiujn mi ricevis, mi povis ekhavi pli bonan ideon pri tiu organiza¼o.*

*Plej trafis min la aparteco de la metodo, nome, ke temas pri interhelpo, kiu ebligas atingi la prinutran memsufiæecon kontraýe de la helpmaniero øenerale renkontata, kiu tenas la profitantojn en ia konstanta dependeco. En Poese mi komprenis, ke se la membroj de la asocio AJBS plu estas solidaraj kaj seriozaj, ili povos post ne longe sufiæe produkti kaj tiel estigi rimedojn por la plibonigado de siaj vivkondiæoj.*

*Do mi taksas la metodon de Monda Fonduso de Solidareco Kontraý la malsato multe pli efika kaj tial mi deziras aniøi. Atendante pli multe fari, mi dezirus partopreni en tiu mutuala solidareco (...).*

*Esperante vian respondon, mi prezentas al vi miajn respektajn salutojn kaj deziras longan vivon al Monda Fonduso de Solidareco Kontraý la malsato.*

*Traoré Boubakar*

---

(enhavo je la fino)

# KONGIO

Sud-Kivuto

## Esperoj pri paco ? Bedaýrinde ne !

Laý la observantoj , la jaro 2000 ne estos la jaro de la paco en la regiono de Uvira : nuntempe okazas en la montaroj multaj militistaj operacioj fare de la diversaj rivalaj grupoj ; oni ankaý observas en la arieroj (la ebena¼o de Ruzizi kaj la æirkaýa¼o de la lagegoj) gravajn manovrojn de bone ekipitaj trupoj. En Kivuto la øenerala deflagro estas timata.

## Spirulino en Kiringye"

Malgraý la teruraj vivkondiæoj, malgraý la pereoj suferitaj en la Komunuma Elvolviøo-Centro de Kiringye, la projekto de spirulinkulturo daýras. La 18an de oktobro 1999 ni ricevis alvokon de KEC Kiringye pere de Solidaraj Popoloj Belgio por reprovizado per spirulinsemoj. Bedaýrinde ni trovis neniun transportan sinsekvon, kiu ebligas rapidan liveron de la petitaj semoj. La vivdaýro de la spirulino ekster sia kulturmedio estas tute ne longa. La plej certa maniero estus trovi vojaøanton, kiu iras de Parizo aý Bruselo al Bujumbura.

---

(enhavo je la fino)

# *REVENO al projekto :*

## La tirkultivo de la GAP Maýena en Gadjagan, Togolando

(Dosiero n92.08.TG)

En la komenco de la Grupo Agro-Paþtista Maýena de Gadjagan, teamo da gejunuloj devenantaj el pluraj lernoniveloj, kiuj æar ili ne plu povis daýrigi siajn studadojn, grupiøis por sin dediæi al la bredado kaj al la porvivaj kultivoj kaj alporti sian solvon al la labormanko.. Fakte sur terenoj haveblaj en Avetonou Maýena elektis sin instali.

La Regiono - La Grupo - La Projekto - La Kontrakto - La Rezultatoj

## LA REGIONO

Gadjagan (aý "Gadzagan" sur la fruaj mapoj) estas malgranda urbo kun 3500 loøantoj en la Regiono de la Altebena¼oj, kun prefekturbo Kloto. Øi troviøas je 21 km sukdokcidente de la regiona æefurbo Kpalimé en direkto de Lomé. La vilaøo Avetonou situas je 5 km de Gadjagan sur tiu sama vojo direkte al Lomé. La farmbieno estas je 2 km de la vojo, interne de la savano.

Kun meza alteco de 100 øis 200 metroj, tiu regiono kun arba savano situas je la komenciøo de la hidrografia reto de la rivero Egbi, kiuj konsistigas penetradon de la baseno de la ganaa Voltao en togolanda teritorio. Arbaro kovras 40 %, sed savaniøas. La sabloþlimaj grundoj tie estus relative fekundaj (kondiæe, ke oni alportu organikan grasumon) se la pluvemo estus konstanta, kio ne estas. Tial dum la sekaj sezonoj, la virinoj kaj la infanoj trairas kilometrojn seræante uzeblan akvon. Du pluvsezonoj kaj du sekaj sezonoj kun neegalaj ampleksoj kaj kun kreskanta nereguleco markas jaron. La meza jara pluvokvanto estas je 1 200 mm

Gadjagan kaj Avetonou estas facile atingeblaj laý la asfaltita vojo kaj la tervojoj, ankaý laý fervojo Lomé-Kpalimé. La plej proksima poþtoficejo situas tamen en Agou-gare (stacidomo) (au Agou Gadzépé), je proksimume dek kvin kilometroj de la farmbieno. Telefono alireblas nur en Kpalimé aý en Agou Nyogbo (æirkaý 20 km de la farmbieno). Nek kuranta akvo, nek elektro. La primaraj flegoj estas donitaj en la supertaskita sanigejo de Gadjagan kaj du hospitaloj kun malgravaj rimedoj funkcias en Kpalimé kaj en Agou Nyogbo. Æiu vilaøo disponas pri bazlernejo, al kio aldoniøas por la tuta regiono dudeko da kolegioj (el kiuj unu en Gadjagan) kaj du teknikaj kolegioj, kio faras el øi unu el la plej lernejaj en la lando : pli ol 80 % de la junuloj. Oni trovas ankaý diversajn instituciojn por profesia klerigado, sed neniun por la plenkreskuloj. Fakte, la junaj diplomitoj elirintaj el la klerigaj lernejoj trovas ne multe da dungo kaj restas je la þarøo de siaj gepatroj, kaj la procento de la adolta analfabeteco ne superas 10 %.

La departemento de Kloto estas unu el la plej dense loøataj en la lando (40 øis 80 h/km²) precipe de la etnoj Eýe en la sudo (plej multaj) kaj Kabje en la nordo. La poligamio oftas, la loøantaro rapide kreskas kaj la procento de disiøintaj familioj altas. La familioj meze nombras 15 membrojn sume de æiuj generacioj. La malpli ol 15jaraj junuloj konsistigas 80 % de tiu loøantaro. La familioj vivas en tradiciaj domoj kun muroj el tero kaj tegmentitaj per pajlo. La riæuloj havas domojn el betono kaj kun tegmento el ferlado. La infana mortokvanto estas iom suba ol tiu landa (86 ‰) en 1995-2000) kaj la esperata vivdaýro estas 50 jaroj. Malario estas la plej ofta malsano kaj unua kaýzo de morto, sed esplorado en la hospitalo de Kpalime montris al ni ankaý gravan kvanton da intestaj parazitozoj, gastroenteritoj, bronkopneýmonioj, laksoj kaj senakviøo.

La infana misnutrado estas øenerala, tiom pro manko de edukado de la familioj pri la bazaj dietaj reguloj, kiom pro manko de la taýgaj nutra¼aj disponeblecoj : kvarono de la infanoj montras ne sufiæan pezon kaj triono kreskan malfruon. Plejparto estas anemiitaj.

Laý la esplorado surloke farita de Gaëlle Cavelier kaj Régis Rouillé en 1997, la æiutaga manøa¼o (æiun tagon preparita por la manøo de la vespero kaj de la morgaýaj mateno kaj meztago) kvalite tre malmulte þanøiøas : bazo el maizo, ignamo aý manioko pistita kun iom da akvo, kun saýco entenanta pimentojn, malgrandajn sardinojn, cepojn, foliojn (kolokasio, manioko...), "gombo", salon, palmoleon laý la riæeco de la familio. Neniam lakta¼oj, dufoje en la jaro viando, malofte ovoj, tro kostaj (la nutrado, tamen vere nesufiæa je lipida kaj proteina nutrokvanto por la infanoj, konsistigas 70 aý 80 % de la familia buøeto). La grenoj kaj la legomoj devenas de la propra produkto de la grupoj ; la aæetitaj produktoj estas la salo kaj la fiþoj. La plidiversigaj produktoj (kokidoj, ovoj, fruktoj...) estas vendataj en la urbaj bazaroj.

La ekonomio de la regiono estas æefe agrikultura : milio, maizo, manioko, rizo, ignamo, olepalmo, kotonujo, kafo, fruktoj (citrusoj, avokadoj, bananoj, mangoj) al kio aldoniøas tektono, plej ofte en la þtataj plantejoj. Tri gravaj bazaroj estas

koncentritaj en radiuso de 10 km : Avetonou, Agou-gare, Amouzoukope. Zooteknika kaj bestkuraca esplorcentro (INVZ) ekzistas en Avetonou. La kultivaj teknikoj restas tradiciaj, per manaj iloj : pioæetoj kaj battranæiloj. La meza monata enspezaro de agrokulturisto estas de 10.000 øis 15.000 CFA F (15 øis 23 EUR).

La Regiono - La Grupo - La Projekto - La Kontrakto - La Rezultatoj

## LA GRUPO

Maýena konsistiøis kun statuto de kooperativeca gea produktogrupo la 29an de januaro 1988. En 1993 øi nombris dek inojn kaj sep virojn kaj øin regis komitato el tri membroj elektitaj por du jaroj. La atribuo de 420 hektaroj da tereno de la societo Togo-fruit, post ties bankroto ebligis al ili projekti la migradon de Gadjagan øis Avetonou, kie ili entreprenis iom post iom konstrui la masonitan domaron, kiu þirmas la familiojn, kaj la kolektivan ekspluatejon de sia nova bieno. Tuj post la instalado, per instigo de sia vigla prezidanto Guede Kossi Mensah, Maýena aranøigis baritan seshektaran lagon tri metrojn profundan per financado de kanada fonduso por la subteno al la lokaj iniciatoj kaj de þtata societo por la progreso (SOTOPRODER). Tiu lago havas du funkciojn : provizi fiþfonton, kaj irigacii la kulturojn dum la seka sezono. 11 membroj ricevis klerigadon en la Agro-paþtista Centro de Notse (je 60 km de la farmbieno), el kiuj kvar pri tirkultivo.

La Regiono - La Grupo - La Projekto - La Kontrakto - La Rezultatoj

## LA PROJEKTO

Konsiderinte la malaltan produktivecon de la mana kultivo kaj la oportunon, kiun konsistigas la dispono de vasta bieno kaj de irigaciilo, Maýena decidis lanæi sin en la tirkultivo, kies enkonduko en regionon, kiu ne havas tiun kulturan tradicion, estas favorigita de la agado de INZV kaj de la Projekto por la vulgarigo de la besta tirkultivo en Atakpamé (PROPTA)

En Majo 1991 Maýena submetis al Monda Fonduso financpeton por tio : temas pri ekipado de la grupo per tirbovoj, jugilaroj, plugiloj, semilo, æaroj kaj diversaj konsumproduktoj. Fakte Maýena deziris provizi 10 familiojn per kompleta ekipa¼o, kio tre superis la financajn kapablojn de Monda Fonduso. Tial nur post tri jaroj de regula traktado kaj dank'al kompleta rearanøo de la projekto kun la helpo de Asocio por la Antaýenpuþo de la Agrokulturistaroj (3A), la solidareca kontrakto estis subskribita de æiuj partioj la 7an de marto 1994.

La Regiono - La Grupo - La Projekto - La Kontrakto - La Rezultatoj

## LA KONTRAKTO

La kontrakto estas tripartia (Maýena/Monda Fonduso/ 3A) kaj difinas la devojn de æiu partnero. Øi ampleksas la provizon de 3 jugilaroj, 2 pluruzaj kultiviloj, 3 æaroj, 1 semilo, 2 sengrajnigiloj, 1 herpilo kaj aro da vicpecoj, kaj ankaý la bestkuracadon kaj la provizadon per organika materio dum unu jaro. Øi projektas la plivastigon de la klerigado de la Maýena-anoj pri la tirkultivo kaj pri la mastrumado, kaj ankaý la daýran teknikan pluzorgadon de 3A dum la starigo de la projekto.

La monsumo atingas tiamajn 1.750.105 CFA F, t.e. nunaj 5.336 EUR, dividitaj en 2/3 de subvencio kaj 1/3 de senintereza pruntodono. Maýena sin devontigis repagi sian prunton per tri jarpagoj ekde la dua produktojaro. La financado estis realigita per du partoj : marto kaj junio 1994. Siaflanke la grupo taskis al si la konstruadon de la bovejo per lokaj materialoj kaj de la magazeno por la þirmado de la materialo kaj staplado de la agrokulturaj necesa¼oj per masona¼o.

La Regiono - La Grupo - La Projekto - La Kontrakto - La Rezultatoj

## LA REZULTATOJ

La 29an de aýgusto 1994, 3A informis nin pri la kompleta plenumo de la projekto. Æio estis en ordo, kaj restis nur... laborigi la jugilarojn. Eæ resta¼o de 500.000 F CFA ebligis senstumpigi la kultivotajn terenojn. Tamen la unua kampanjo estis iom malfacila pro pluvmanko, kiu estigis redukton de la nutroporcio de la bestoj, dum la problemo pri irigacio ankoraý restis teknike sensolva manke de motorpumpilo. Tamen en februaro 1995 Alain kaj Nadine Cavelier povis propraokule konstati la bonan staton de la bestoj, la bonan prizorgadon de la materialo kaj la plivastigo de la legomkultivado.

La tirkultivo ebligis multobligi la kultivitajn surfacojn, interalie pri maizo kaj rizo. Maýena povis aldoni la kultivon de sojo al sia kultivplano. La grena produktiveco pasis en 1995 de 1,5 øis 4,5 tunoj/ha malgraý la malbona distribuiøo de la pluvoj, dank'al pli bona preparado de la grundo. Parto de la rikoltoj estas vendata por konsistigi þparon, alia estas konsumata de la grupo mem. En 1995 la monata enspezaro de æiu membro pasis de 5.000 øis 15.000 CFA F. Du pliaj junaj inoj aliøis al la grupo, kiu krome komencis klerigi tri junulojn pri la tirkultivado. Kaj jam en aprilo 1996 Maýena estis repaginta la unuan jarpagon de sia pruntopreno !

Sed æiam ekzistas transpasotaj baroj kaj neatendita¼oj : en 1996 : la pereo de bovo mordita de serpento forigis la disponon de la bovparo; Kaj komence de 1997 kampo de "gombo" forbrulis pro savana brulo. Krome la poþtaj komunikoj æesis dum16 monatoj en 1998-1999, tial nur malfrue ni eksciis la perdon de alia bovparo pro malsano kaj la damaøajn efikojn de la pluvaj ekscesoj en 1999 ! Tamen Maýena povis repagi sian duan jarpagon en 1998, kaj S-ro Guede anoncas la lastan por marto 2000.

La traviva¼oj estas severaj, sed la kuraøo de niaj amikoj estas granda. Plurjara kunlaborado konvinkigas nin, ke ili scios restrebi tiel bone, kiel ili plenumis sian mutualistan sindevontigon. Dank'al ili aliaj grupo profitos post ne longe de sia propra financricevo. Ni plikuraøigu ilin rapide rekonsistigi sian bestaron - sian laborforton ! - kaj evoluigi øin laý la komenca celo : unu jugilaro por æiu familio !

*AC*

---

(enhavo je la fino)

# FINANCADO DE LA FEDERACIA ASEMBLEO

# DE MONDA FONDUSO

Grave kaj forte simbole estas, ke la unua Federacia Asembleo de Monda Fonduso okazos en Benino, en Afriko. Øi estos ege densa traviva¼o detale preparita de niaj mutualistaj amikoj de tiu regiono, plejtaýga momento por elprovi la solidarecon, la mutualismon, la transnaciecon kaj la mondan demokration, kiujn la fondintoj volis enblovi en Mondan Fonduson de Solidareco Kontraý la Malsato.

Dum oni nombras æirkaý 600 membrojn en tiu regiono, nur 60 delegitoj de la grupoj plenrajte partoprenos en øi. Kiam ili revenos en siajn vilaøojn, aý siajn grupojn, ili raportos pri æio, kio fundamentas nian solidarecon. Do tute certe, diskuto, kiu poste disvastiøos kaj koncernos milojn da homoj.

La vojaøo, la gastigado kaj la manøoj de la delegitoj kaj de la Administra Konsilantaro dum ambaý kongresaj tagoj sume kostos 4.204 EUR (2.757.800 CFA F.) Tio estas tre modesta buøeto por tia kongreso, sed tamen tio necesigas pliajn rimedojn rilate al la antaýaj jaraj buøetoj. Dume la projektoj (kaj la personoj) kiuj atendas financadon, ne devas suferi pro la kongreso. Tial ni lanæas **kongresan subskripcion**, kiun ni proponas al æiuj, kiuj povas fari pagon kroman rilate al siaj ordinaraj kotizoj; La kasisto antaýdankas ilin.

MFSCF - Monda Solidareco - “Kongresa subskripcio”. CCP PARIS 10734 96 Z je la adreso de la bulteno.

---

(enhavo je la fino)

# *LA INFANOJ DE GUIE*

En la franca departemento "Corrèze" (Korezo), ne tre malproksime de la montetoj Monédières karaj al la akordionisto Jean Séguriel en la loko nomita "Les Renardières" ekzistas - se la þtormego de decembro fortega en tiu regiono domaøis øin - ekzemplodona hejmo de nordsuda solidareco.

En 1989 Henri Girard, juna korezano edzo de Burkinanino, decidis meti siajn agrikulturajn konojn je la servo de la kamparanoj de Guié, urbeto situanta norde de Ouagadougou. Marthe, lia edzino, okupas sin pri la infanoj de tiu regiono kaj, en 1990, estas kreita la modela farmbieno : plantidejo, provkampoj, bredparko.

En 1992 sekvas la kreado de kleriga centro : skribolernado, vesperaj kursoj, biblioteko, kaj æio kun la financa helpo de bando da korezaj amikoj. Ankoraý sekvas en 1995 la kreado de infanakceptejo provizita per bebejo, C.A.E.D. kiu akceptas orfojn, marøenigitojn, forlasitajn infanojn, kaj de prinutra centro, C.R.E.N..

En 1998, unu el tiuj korezaj kunuloj, Philippe Gouygou, dum siaj ferioj instalas sunpanelojn provizitajn de EDF (francia elektra kompanio) por ekipi bazan sanigejon (konsultoj, akuþejo, ktp.) freþe instalitan en Guié.

En La Renardières, S-ino Lachassagne, prezidantino de "Infanoj de Guié" kaj adopta patrino de du burkinaj infanoj, plu klopodas por tiu afrika regiono. Por pligrandigi la prinutran centron kaj konstrui grandan atendoæambron por la infanoj kaj la familioj, projekto, kies suma financado kostas 12.500 EUR, estas kuranta, kaj S-ino Lachassagne jam ricevis la promeson de 6.100 EUR de la Regiona Konsilantaro de Limoøio.

Tiu loka esprimo de la nordsuda solidareco, kvankam malsama ol la nia en sia klopodo, laý ni menciindas pro sia realismo kaj sia efikeco.

*BM*

---

(enhavo je la fino)

# LA SABLERO (n93)

La koncepto pri "Monda Fonduso" aplikita al speco de planeda solidareco, ekaperas en la civila socio. Tie temas pri la punkto 4 el listo de postuloj tiritaj el la interligilo de la asocio ATTAC (asocio por la impostado de la financaj transakcioj helpe al la civitanoj) al kiu aliøis nia propra Monda Fonduso.

(...)

"4) la praktikigo (fare de Internacia Mona Fonduso IMF se eble profunde reformita, fare de aliaj instancoj se necese) de imposto kiel "Tobin" por plej redukti la spekulacion (kiel deziris tion la Nobelpremiito pri Ekonomio). Por la CADTM (komitato por la nuligo de la triamonda þuldo), la enspezoj el tia imposto estus (ekzemple po duono) dediæitaj al kreota nova Monda Fonduso por ke øi transdonu tiujn monsumojn al la landoj de Periferio kiel kompenson fare de la nordaj landoj pro la multjarcenta disrabado, al kiu submetiøis la sudaj popoloj (la Monda Fonduso de Kompenso estus kontrolita rekte de la kompensotaj landoj kun en ilia sino aktiva rolo de la socialaj movadoj). La restanta parto el la enspezoj estus utiligita en la nordaj landoj kiel helpo al la civitanoj (dungokreado, evoluo de la socialaj elspezoj)"

---

(enhavo je la fino)

### *Forpasis du elstaraj kunlaborantoj de Monda Fonduso :*

| *Alexis Somé* | *Armand THAMBA-VANGU.* |
|---|---|
| Li estis suna persona¼o. Radianta de inteligenteco, de simpatio, de frateco, Alexis Somé estis brilanta esploristo, al kiu oni konas nur amikojn. Nenombreblaj ! tiel en | Per la bulteno REC-Info 1/2000, ni eksciis la murdon de Armand THAMBA VANGU, deveninta de malalta Kongo, direktoro de la Oficejo pri Medicinaj Aferoj de la diocezo de Uvira (Sud-Kivuto). En Monda Fonduso ni laboris kun Armand Thamba en 1993, kiam li ricevis la taskon kolekti la raportojn |

Francio, kie li trapasis agronomian tezon, kaj laboris en INRA (Nacia Instituto por Agronomia Esplorado), kiel en Burkinio, sia devenlando, kien li reiris por elvolvi grandvoleman kaj malfacilan programon por la disvastigo de la terpomkulturo. Alekso estis "tiu, kiu donacas" : siajn konojn, sian korinklinon, sian grandegan dinamismon, sian solidarecon, sian festoøojon, al æiuj, en æiuj cirkonstancoj. Korespondanto de Monda Fonduso en Burkinio, li grave kontribuis starigi la projekton de AJBS de Song Naba en Poese (v. poste). Li forlasis nin en januaro, 37jara, pro suferiga malsano.

*Alekso, je miaj okuloj, cia sufero kaj cia morto estas tute maljustaj. Sed nia amemo æiam cin akompanos.*

*A.C.*

pri utiligo de la 50 kg de spirulino ekspeditaj ekde Æilio : li profitigis la vizitojn, kiujn li faradis al la regionaj hospitaloj kaj sanigejoj por kolekti la informojn. Antaý ne longe Armand Thamba kontaktis nin seræante rimedojn bezonatajn por helpi la loøantaron de la regiono de Uvira, terure afliktitan de la nuna milito (Vd Monda Solidareco n62, paøo 4). Armand Thamba estis ankaý adjunkta direktoro de Caritas-Uvira, kaj tiel laboris kune kun Doktoro Miteyo Nyenge, kiun la legantoj de Monda Solidareco bone konas, æar temas pri la direktoro de la Komunuma Elvolviøo-Centro de Kiringye.

Armand Thamba estis murdita en Bujumbura (Burundio) dum li ¼us retratis monon el banko por la bezonoj de Caritas-Uvira. Certe temas pri rabmurdo.

Ni kondolencas lian familion kaj liajn proksimulojn, kaj prezentas al liaj kolegoj de la humanaj servoj, en kiuj li laboris, niajn viglajn kuraøigojn por daýrigi la laboron.

*DD*

---

(enhavo je la fino)

# MANIFESTO 2000

### Por kulturo de paco kaj de neperforto

Pluraj personoj jam sendis al ni la Manifeston de la jaro 2000 subskribita. (vd Mondan Solidarecon ,n64). Daýras la momento por fari tion. Ni transdonos æiujn subskribojn al Unesko en konvena tempo. UNESKO celas kolekti CENT MILIONOJN da subskriboj antaý la venonta Øenerala Asembleo de UN en aýtuno de tiu æi jaro.

Esperantlingve : http://www.recim.org/dem/manifesto2000.htm

France, hispane, anglalingve : **http://www2.unesco.org/manifesto2000/**

NB : La esperantlingva teksto de la Manifesto2000 estas þirmita en tiu paøaro, sed laý iniciato de Henri Masson (Sat-Amikaro) estas nuntempe agado al Unesko por ke almenaý ligilo estu farita inter ambaý paøaroj.

---

(enhavo je la fino)

## Mallongigoj

**3A :** Asocio por Antaýenpuþo de la Agrokulturistaroj

**ATTAC :** Association pour une Taxe sur les Transactions financières pour l'Aide aux Citoyens : Asocio por la impostado de la financaj transakcioj helpe al la civitanoj. http://www.attac.org

**GOT** : Grupo de Orfoj en Tozunme (Benino)

**IRIN** : *Integrated Regional Information Network* (UN) Regiona integrita informreto

**NÞO** : Ne Þtataj Organiza¼oj (ankaý ofte diritaj "Ne-Registaraj Organiza¼oj)

**UN** : Unuiøinta Naciaro

**UNESKO** : Organiza¼o de Unuiøinta Naciaro por Edukado; Scienco kaj Kulturo

---

Redakcia komitato : François Barré, Alain Cavelier, Danièle Charier, Odile kaj Daniel Durand, Bernard Muet, Claude Tellier

Elfrancigis : Daniel Durand

Lingve kontrolis : Daniele Pesce

Directeur de la publication : Daniel Durand

Fakso : +33 (0)241 78 47 75

**MONDA SOLIDARECO**

Les Nids

FR 49190 St-AUBIN-DE-LUIGNE (Francio)

---

## ENHAVO :

- Bonan jaron al æiuj

- STOP' !
- Nia agado en Haitio
- Kio pri la projektoj ?
- Oni skribas al ni
- Kongio : Sud-Kivuto
- Spirulino en Kyringyé
- Reveno al projekto: GAP Maýena en Gadjagan
- La infanoj de Guié
- Kongresa subskripcio
- La sablero
- Forpasis du kunlaborantoj de Monda Fonduso : Alexis Somé kaj Armand Thamba Vangu
- Manifesto 2000 (UN - UNESKO)
- mallongigoj
- Eýro : Kiel pagi ?

  Financoj, kotizoj, abonoj, ktp.

  Por diskonigi Mondan Fonduson



---

paøo realigita de Daniel Durand per la litertiparo Latin 3